Ročník I. Číslo 1.

BULTENO
de

# ĈEĤOSLOVAKA **P R E S O** ESPERANTA

---

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA II., KŘEMENCOVÁ 17.
ELDONANTO KAJ RESPONDA REDAKTORO: AUG. PITLÍK.
Jarabono ( 12 numeroj ) 10 Kč, fremdlando 15 Kč.

---

Enhavo: Profetaĵoj de Comenius. – Dudek kvin jaroj de la Esperantista klubo en Praha. - Kiel la aŭstriaj detektivoj serĉis verkojn de aŭtoro "Kara samideano. - Kelkaj ciferoj pri UEAmovado en ČSR. - Informaj aldonoj: Ĉeĥa kaj internacia.

. . . . o X o . . . .

## P R O F E T A Ĵ O J  D E  C O M E N I U S
/ Al la 28a de marto /

La dudek okan de marto 1592 naskiĝis en Moravio Ĉeĥa korifeo Johano Amos K o m e n s k ý /Comenius/, nomata "instruisto de nacioj", kiu pli detale ol iu ajn alia el la ofte citataj tiutempaj scienculoj pripensis la bezonon kaj eblon krei artefaritan helpan lingvon . Kvankam li ofte tuŝas ĉi tiun demandon ankaŭ en la verkoj "Pansophiae diatyposis" /1643/, "De rerum humanarum emendatione consultatio katholica" /1646/ kaj "Linguarum methodus novissima" /1646/, tamen precipe ĝi estas priparolita en la verko "Via lucis" / Vojo de lumo/, finita en la j. 1641, kie troviĝas profetaĵoj, kiuj - eldiritaj antaŭ pli ol 300 jaroj - plenumiĝis nur en la j. 1887 per kreo de esperanto kaj respondas demandojn, ankoraŭ hodiaŭ ofte aŭdatajn ĉe neinformitaj scienculoj.

Kvankam la verko estas plenplena de tiurilataj ideoj, la plej interesaj estas la jenaj:

"Kaj estos verŝajne neniu, kiu povus dubi, ĉu estas eble krei novan lingvon, de tamen en iu naskiĝus tia penso, mi respondos, ke estas eble ... Ĉar, se ĝis nun estis eble por Adam, por la saĝuloj, por la metiistoj kaj por homoj iuj ajn donaci specialajn nemojn al objektoj, kial ne estus eble kreadi ankaŭ la vortojn kaj la partikulojn kaj la ceterajn bezonaĵojn al la tuta afero apartenantajn? Kaj se iĝis hazarde tiom da lingvoj per la sola intermiksiĝo, kial ne povus iĝi ankaŭ unu per interkonsento kaj prudento kaj per refoja restarigo pura kaj arta?" /XIX.18/

"Nepre tamen estas preferinde aprobi tiun vojon, kiu celas krei iun por la tuta mondo komunan lingvon." /XIX.6/

"Laŭ diversaj vojoj devos la scienculoj pripensadi la manieron, laŭ kiu aŭ ili mem akiradus la scien de iuj ajn lingvoj aŭ unu ian lingvon kreus per kiu ili mem reciproke interkompreniĝus kaj ĉiujn raciojn, eĉ la tute necivilizitajn, pri ĝi facile povus instruadi." /XIX.5/

"Ĉar pli facile estas por ĉiuj ellerni unu aferon ol por unu persono ĉiujn aferojn ......" /XIX.4/

"Ni opinias, ke unu sola, komuna lingvo estas por la mondo bezona, kaj se estos neniu alia, ke estos konvene, elekti por tiu celo prefere la latinan lingvon el iun ajn alian. Sed ĉar niaj ideoj jam nun sin portas pli alten, ni ne povas trovi alian helpon, krom konsili prefere al kreo de absoluta nova lingvo." /XIX.9/

Kiam pli poste H a r t l i b petis liu prijuĝi lian pasigrafian projekton, respondas al li Komenský en la letero de la 12a de junio 1647 jene:

"Via klopodo pri la komuna skribmaniero por ĉiuj popoloj kaj lingvoj tre min interesis, kvankam de ĝi mi ne atendas tion, kiom mi dezirus. Milfoje pli bone estus havi lingvon novan, ĉiurilate sur la prudento bazitan." -

La signifo de mondpedagogo Komenský kaj liaj ideoj pri artefarita helplingvo multe helpus la priesperantan propagandon ĉe la ĉeĥa publiko. Ĉeĥaj esperantistoj aranĝu de ĉiujare je la naskiĝtago de Komenský propagandajn entreprenojn pri "Komenský, eminenta pioniro de artefarita helpa lingvo internacia", kio komprenigus al la ĉeĥa nacio pli bone kaj pli sukcese la neceson de esperanto ol alportitaj fremdaj ideoj pri internaciismo.P.

. . . x X x . . .

## DUDEK KVIN JAROJ

## DE LA ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
/ 1902-9. XII. -1927 /

Antaŭ la fondiĝo de la "Esperantista klubo en Praha" estis en ĉeĥaj landoj tri propagandaj centroj: En Pardubice Fr.Vl. L o r e n c, la unua ĉeĥa esperantisto, en la j.1890, do jam du jarojn post la apero de la "Unua libro" de dro Zamenhof, skribis sian "Plenan lernolibron de la lingvo internacia de dro Esperanto".

En Brno propagandis esperanton Kajš kaj Pelant, uzantaj ĉiun okazon por disvastigo de ĉi tiu lingvo ankaŭ en aliaj urboj. Sed ĉefa ĉeĥa pioniro de esperanto estis instruisto Th. Čejka, kiu ĝis konstiruiĝo de la klubo en

Praha estis animo de ĉeĥa movado esperantista, eldorante vicon da lernolibroj komence eĉ kun grandaj financaj oferoj. En lia hejmo en Bystřice pod Hostýnem komencis en novembro 1902 aperadi la unua gazeto en ĉeĥaj landoj "Revuo internacia" kun ĉeĥa kaj germana aldonoj, el kiuj, kia post la 5a numero la germana ĉesis aperadi, la ĉeĥa fariĝis sendependa gazeto "Bohema esperantisto".

Ankaŭ en Praha la granda ideo de lingvo internacia baldaŭ entuziasmigis kelkajn idealajn animojn, kiuj komence ne sciis unu pri la alia. Sed sopirante interkorespondadi kun la samideanoj eksterlandaj kaj konvinkiĝi pri la praktika apliko de esperanto, ili sciigis siajn nomojn en la adreso, kiun tiutempe eldonadis dro Zamenhof. Kaj jen, serĉante samcelanojn en malproksima fremdlando, ili trovis sin mem! Ilian konatiĝon helpis baldaŭ efektivigi Ruso Seleznjev, kiu, vojaĝanta okcidenten, serĉis en Praha laŭ la nomita adresaro samideanojn.

Lia vizito en Praha postlasis grandan intereson pri esperanto kaj fondiĝo de esperantista klubo, kies konstituiĝanta kunveno okazis la 9an de decembro 1902 en la restoranto "U Štajgrů". Kvankam la ĉambrego estis tro granda por 25 personoj, tamen post momentaj embarasoj ĝi fariĝis malgrandema por entuziasmo de ĉeestintoj, kiuj metis fundamentan ŝtonon al "Esperantista klubo en Praga", el kiu pli poste evoluis centra organizo de ĉeĥaj esperantistoj. Unua prezidanto estis elektita librovendisto E. Weinfurter, sekretario Fr. Barth. Sidejo de la klubo estis kafejo "Union".

Tiamaniere estis fondita la vere unua ĉeĥa esperanta societo; la iomete pli frue konstituiĝinta "Unua societo da aŭstriaj esperantistoj" en Brno estis nome ĉeĥogermana kaj neniam atingis la famon de "Esperantista klubo en Praha", kiu cetere ĝis hodiaŭ disponigas al la ĉeĥoslovaka movado esperantista ne sole per la nombro sed ankaŭ kvalito de siaj membroj la plej firman apogon. K P.-H.

. . . o o O o o . . .

## KIEL LA AŬSTRIAJ DETEKTIVOJ SERĈIS VERKOJN DE AŬTORO KARA SAMIDEANO
/ Mondmilita remamoro /

En aŭgusto 1914 estis surprizitaj ĉeĥaj esperantistaj ĉefuloj en Praha per loĝejaj revizijoj, kiujn faris detektivoj, provizitaj per ĉiopova dekreto ! . . . . ĉar ĉe vi troviĝas aŭ povus troviĝi patrujperfilaj aferoj, oni ordonas . . . ." Ĉe la revizio la detektivoj insiste postulis precipe transdori korespondaĵojn, flugfoliojn, broŝurojn, kaj librojn, verkitajn de aŭtoro Kara Samideano. Tial estis konfiskitaj ekzemple ankaŭ fremdlingvaj libroj pri kuirarto, vortaro, de ekzotikaj lingvoj, preĝlibroj, prazaroj, muziknotoj, mallonge dirite ĉio, kio surhavis la vortojn "kara samideano" aŭ "samideane". Kelkaj policanoj forportis sian rahaĵon en la poŝo aŭ sur la brako, tiuj pli ambiciaj forveturigis ĝin sur ĉaro. Estas memkompreneble, ke la nomitaj revizioj kaŭzis al la esperantistoj multajn malagrablaĵojn kaj malulitojn: evitadis ilin-per unu piedo jam starantajn en la malliberejo-la kunloĝantoj, patriotaj domposedantoj pripensadis ilin malluigi. - Sed ankaŭ la esperantistoj estis surprizitaj per tis vigleco de la polico ! Ili ja bone sciis, ke ili en eksterlando uzis esperanton por propagando de kulturaj celadoj de ĉeĥa nacio, sed tion ili ne konsideris perfido je la aŭstria ŝtato. Nur 6 semajnojn post la revizio ili ekkomprenis ĉion! Invitite al la policestrejo ili eksciis, ke tiutempe ĉe la poŝtoficejo estis konfiskitaj esperantaj flugfolioj, senditaj Bohemujon de francaj esperantistoj helpe de la italaj, kiuj enhavis alvokon "Formetu armilojn!" kaj estis surskribitaj per kutimaj vortoj "Kara samideano"!

Estas memkompreneble, ke la detektivoj estus fortostreĉe laboristaj, se ili estus forportontaj al policoficejo ĉion, kion la viglaj esperantistoj de Praha helpe de la eksterlandaj "karaj samideanoj" amasigis en siaj hejmarĥivoj kaj bibliotekoj! P.-H.

. . . o O o . . .

## KELKAJ CIFEROJ PRI U.E.A. - EVOLUO EN Ĉ.S.R.

En la jaro 1927 vivis en Ĉeĥoslovaka respubliko 1337 membroj de Universala Esperanto-Asocio, el kiuj estis 430 membroj / simplaj /, 887 m.abonantoj, 19 m.subtenantoj kaj 1 m.dumviva, kiuj enture pagis da kotizo 58.425 Kĉ. - La servojn prizorgadis en 293 ĉs. lokoj 360 delegitoj kaj viedel. /202 Ĉeĥoslovakoj, 126 Germanoj, 23 Magiaroj kaj 10 Poloj /. - La teritoria ĉefdelegitejo ricevis 2109, ekspedis 10.142 korespondaĵojn kaj presaĵojn. - Ke depost la jaro 1922, kiam estis kreita ĉeĥoslovakuja U.E.A. - teritorio, la membraro de U.E.A. en Ĉ.S.R. pli ol duobliĝis / 634:1337 / kaj la lokoj kun delegitoj preskaŭ kvaronliĝis / 75:293 /, oni dankas plejparte la propagandemon kaj persistemon de ĉefdelegito O. Sklenčka, kiu sukcesis, ke ĉeĥoslovakuja U.E.A. teritorio fariĝis efektive modela. P.

. . . o o o O § O o o o . . .

# KRONIKO

## PRAHA:

Esperantista klubo:

En la klubo, kunvenanta ĉiuvendrede en Praha I. Pernštýn 11. /subtera restoracio de Odborový dům / okazis: 2.XII.1927:"Vespero de sankta Nikolao", dum kiu bonkora Nikolao /so Šustr/, akompanat de ĉarma anĝeleto /so Koutek/ kaj timigi diableto /f-ino Tarantíková/, disdonis al la bonaj klubanoj donacojn, transportitajn teren de ĉiela poŝtdirektoro Bloch.-16.XII. "Tago de la libro": prologis so Pitlík pri naskiĝtago de la Majstro fr.Richterová recitis poemon de O. Flatauer "Librofesto en Esperantujo", kiun sekvis parolado de so Eiselt "Esperantaj libroj". En la kluba librovendejo oni aĉetis tiutage 71 librojn por 1000 Kč. - 6.1.1928: Parolado pri Egipto de so Šustr, akompanata per relaj lumbildoj. -20an de januaro okazis jubilea ĝenerala Kunveno /raporto en 2a no./, 3.II. okazos parolado de so Šustr pri "Kalifornio, lando de eterna printempo" /Lumbildoj./ - Ĉiun unuan vendredon de la monato okazos en la klubejo kunveno kun la instrua aŭ amuza programo. -Konversacian rondeton, kunvenantan antaŭ la malfermo de la klubaj kunvenoj, estrasso J.Novák. -/ Al 1 2.XII: Partoprenis f.Hlaváčová, Hroníková,
inĝ.Molnár /.

Rondeto de esperantistinoj

translokiĝis kune "Ženský klub" en la straton Poříč no.5. -Okaze de la 40jara datreveno de esperanto estis la 27.XI. aranĝita en hotelo "Palace" parolado de faka instruistino J.Šupichová "Verko de Zamenhof." - R.kunvenas ĉiumerkrede je la 20a h.

Ĉeĥoslovaka katolika Esperanto - Unuiĝo

/ Praha II. Spálená / celas unuĝon de ĉiuj ĉeĥoslovakaj katolikaj - - - samideanoj por propagandaj celoj en Ĉeĥoslovaka respubliko. -kunvenoj ĉiujaŭde je la 7a h. en la abstinenta restoracio / Praha II. Ostrovní ul. /

U. E. A. kunveno

okazis en Měšťanská beseda la 8.XII.1927, ĉeestis ĉirkaŭ 50 ĉeĥaj kaj germanaj gesamideanoj. Ĉefdelegito Sklenčka interese raportis pri UEA servoj kaj agado de ĉeĥoslovakuja teritoria oficejo.

Instituto por blinduloj de Hradčany

aranĝis 8.XII. okaze de la 40 jara jubileo de esperanto paroladon de f.instr. Šupichová kaj akademion kun tre interesa kaj riĉa programo deklama kaj muzika. Prologis instituta direktoro so Hraba, la festvesperon malfermis prez. Kuchař. Je la programo partoprenis: so Echtner, ĥoro de blinduloj, kvarteto blindula, Fr. Hrdličková, Ptáčková, sino Stejskalová, knabo Kouřím, soj Vitič, Soška, Pilňák, Trdla. Estus dezirindaj pluaj tiaj modelaj aranĝoj!

## KUTNÁ HORA:

Esperantista klubo aranĝis 17.XII. en klubejo ĉe "Žluté kolo" rememoran vesperon pri la 40jara ekzisto de esperanto kaj 10 jara mortiĝo de dro Zamenhof. Prologis direktoro Horáček. La tre plaĉan deklam- kaj muzikprogramon kunhelpis: damoj Řehnová, Žalmanová, Černochová, Novotná, Šimánková, Walnzetlová kaj soj Žák, Houša, Marek, Lanra, Souček, Šank, Jelínek. Dum festvespere estis surpendigita diplomo por la kluba partopreno je la ekspozicio en Čáslav.

## PARDUBICE:

Esp.klubo de "Dro Schulhof" aranĝis 26.XI. Pietan memorvesperon pri sia fondinto kaj ĉeĥoesperanta poeto dro St. Schulhof, al kies organiza talento oni dankas ĝenerale la ĝisnunan viglan esperantan movadon en orienta Bohemujo. Prologis prez. inĝ. Berger. Belan deklam-, kant-, kaj muzikprogramon helpis

efektivigi: sinoj Petrová, Veverková, dro Fousek, f. instr. Michalová, soj Martin, Petr, Macák, Máchal, prof. Krejza, Jandík. La vesperon, kiu antaŭenpuŝis la lokan propagandon, ĉeestis oficiala delegito de Esp.Klubo Praha so Bloch.

RADIOPAROLADOJ:

Radio-ĵurnalo de Praha disaŭdigis ĉeĥajn paroladojn de f.instr. Šupichová la 15.XI. pri "Jan Amos Komenský /Comenius/ kaj ideo de la lingvo internacia" kaj 15.XII. "Pri la reinto de esperanto", 3.XII. kaj 16.1.1928 esper.paroladon de JUC Bořivoj Beretka "Ĉeĥoslovaka historio" – Laŭ sciigo de Radioĵurnalo okazos el la j. 1928 en Praha radiofonaj esperantaj kursoj.

KURSOJ:

Ĉeĥoslovaka esperanta instituto malfermis la 9.I.1928 en sia "Privatavetalernejo de esperanto", aprobita de la ministerio por instruado, novajn kursojn por komencantojn kaj progresintoj. 13 lernantojn instruas fr. Hlaváčová, 12 dir. Pitlík. En orfejo "Joaneum" en Praha aranĝas frato Václav esperantan kurson por 35 ĉeestantoj.

DIVERSAĴOJ:

Tutŝtata Kongreso ĉeĥoslovakuja estas proponata por la j.1928 laŭ niaj informoj en Brno, pro la tie okazanta ĉs.ekspozicio de la samtempa kulturo en ČSR. - La ŝtataj ekzamenoj por instruado de esp. en ĉs. komunumaj kaj burĝaj lernejoj okazos en aprilo. Informu vin pri detalaĵoj ĉe ekz.komis.so J.Eiselt, Vinohrad, Slezská 58. - Por la j. 1929 estas proponata en Praha universala antaŭkongreso kaj katolika esp. kongreso okaze de la miljara datreveno de la morto de ĉefa princo, sankta Venceslao. - Membroj de la U.E.A. en Praha Bíba kaj Macháček forveturis la 4.I. Argentinon – So Ĉe aranĝis en Svedujo vicon da sukcesaj paroladoj pri Praha kaj Ĉeĥoslovakiaj turismaj atrakcioj. - Sciigojn pri eksterlanda movado esper. serĉu en ofic. organo de UEA "Esperanto" kaj en "Heroldo de esperanto." - Organizu vin loke, laude /ŝtate/ kaj internacio! En organizo sole estas forto!

ENKETO DE "ESPA":

"Kiel kaj kial mi fariĝis esperantisto?" - La plej interesan respondon ni presigos en la Bulteno de Ĉ.P.E., la aliajn ni mencios. La materialo estos uzota por pliriĉigo de la poresperanta propagando en Č.S.R. Partoprenu la enketon!

## Redakciaj sciigoj

La Bulteno aperados regule la 20an de la monato en ĉi tiu formo, uzata ĉe bultenoj de "korespondaj kaj precaj oficejoj." - Ĉs. Esperantistoj, transdonu la ĉeĥan alionen al la redakcio de via loka ĵurnalo aŭ gazeto kaj sendu al ni tiurilatan altransĉajon! - Redakcioj de la esper. gazetoj estas potataj interŝanĝadi kun ni sian gazeton. Eldonantoj de esper. libroj sendadu al ni 1 ekzempleron de la eldonitaĵo por recenzo kaj rekomendo en la de ni preparata libro-servo! - Ĉs. Esper. societoj, delegitoj de UEA kaj opaj esperantistoj sciigadu al la redakcio en intereso de la ĉs. esperant. historio ĉiujn novaĵojn priesperantajn, en viajloko kaj regiono okazintajn. La redakcio publikigos ankaŭ seriozajn proponojn kaj artikolojn, rilatantajn al plibonigo de esper. movado en ČSR kaj tiurilata organizo. - Diskonigu la bultenon kaj sciigu al ni novajn adresojn! - La verda aldono estas grandnombre sendata eksterlanden.

. . . o o o O § O o o o . . .

Novinová sazba povolena č. 319.227/VII.27.pošt. řed. V Praze.